Bob Dylon ,

# Kiom da mono elspezas la mond'

*tradukita de Joachim Gießner*

Kiom da mono elspezas la mond'
por bomboj, raketoj kaj mort'?
Multaj sin gloras, paradas per bus',
sufer' nek mildiĝas nek sort'.

Kiom okazu ankoraŭ mizer',
ĝis venos por savo la vort'.?
Respondas, amik', tutsole nur la vent',
respondas tutsole nur la vent'.

Kiom da vojoj en tuta la mond'
abundas per larmoj, sufer'?
Kaj oceanoj ĝis mara profund'
plenplenas per trista mizer'!

Kiom da inoj dum tutsola viv'
atendas en vea toler'?
Respondas, amik', tutsole nur la vent',
respondas tutsole nur la vent'.

Kiom da homoj en malliberec'
sopiras la ŝanĝon de l' stat'?
Kaj geinfanoj milionoj dum nokt'
ne dormas pro morda malsat'!

...

Bob Dylon ,

# Blowin' in the Wind

How many roads must a man walk down
Before you call him a man?
How many seas must the white dove sail
Before she sleeps in the sand?

Yes, and how many times must the cannonballs fly
Before they are forever banned?
The answer, my friend, is blowin' in the wind
The answer is blowin' in the wind

Yes, and how many years can a mountain exist
Before it is washed to the sea?
Yes, and how many years can some people exist
Before they're allowed to be free?

Yes, and how many times can a man turn his head
And pretend that he just doesn't see?
The answer, my friend, is blowin' in the wind
The answer is blowin' in the wind

Yes, and how many times must a man look up
Before he can see the sky?
Yes, and how many ears must one man have
Before he can hear people cry?

...

Bob Dylon ,

# Kiom da mono elspezas la hom'

*tradukita de Manfred Retzlaff*

Kiom da mono elspezas la hom'
Por la armilar' sur la ter'? -
Kaj kiom da vortoj diratas de li?
Kaj ne malpliiĝas mizer'!

Ĉu devos okazi la lasta milit'
Kun neimagebla mizer'?
Respondon, amik', ja scias nur la vent',
Repondon ja scias nur la vent'.

Kiom da stratoj sur tiu ĉi ter'
Kondukas al senesperec'? -
Kaj tiom da maroj en tiu ĉi mond'
Plenplenas de plor' kaj tristec'? -

Kaj kiom da inoj atendas, ho ve,
Kaj restas en tia solec'?
Respondon, amik', ja scias nur la vent',
Repondon ja scias nur la vent'.

Kiom da homoj en malliberec'
Suferas nur pro opini'? -
Kaj kiom da homaj infanoj, ho jes,
Malsatas sur ter tiu ĉi?

...

Kiom da homoj noktpetas en rev':
"Ho venu al ni bonas fat'!"
Respondas, amik', tutsole nur la vent',
respondas tutsole nur la vent'.

*Traduko de la Angla poemo "Blowin' in the Wind" de* Bob Dylon *(civila nomo: Robert Allen Zimmermann, *1941-05-24) en Esperanton de* Joachim Giessner *(*1913-12-23 – †2003-11-25).*

*Arg-720-1449 (2012-12-11 09:50:59)*

*Troveblas tiu ĉi esperantigo de la kanto-teksto en* http://www.esperanto.de/kantoj/kantoj.pdf *sub* http://www.esperanto.de/kantoj/index-giessner.html. *Pri Joachim Gießner vidu la vikipediejon* http://de.wikipedia.org/wiki/Joachim_Gie%C3%9Fner.

Yes, and how many deaths will it take 'til he knows
That too many people have died?
The answer, my friend, is blowin' in the wind
The answer is blowin' in the wind.

*Verkinto de tiu ĉi Angla poemo estas* Bob Dylon *(civila nomo: Robert Allen Zimmermann, *1941-05-24), publikigita 1962-04.*

*Arg-720-1446 (2012-12-11 09:07:24)*

*Pri la aŭtoro, vidu la retejon* http://www.songlexikon.de/songs/blowinwind, *pri la teksto la retejon* http://www.songtexte.com/songtext/bob-dylan/blowin-in-the-wind-2bd5e8d2.html. *La melodio estas aŭdebla en* http://www.youtube.com/watch?v=tGO8snK98l0 *kaj en* http://www.myvideo.de/watch/3594984/BOB_DYLAN_BLOWIN_IN_THE_WIND.

Kaj kial la revoj sur pac' sur al ter'
Ne efektiviĝas sur ĝi?
Respondon, amik', ja scias nur la vent',
Repondon ja scias nur la vent'.

*Traduko de la Angla poemo "Blowin' in the Wind" de* Bob Dylon *(civila nomo: Robert Allen Zimmermann, *1941-05-24) en Esperanton de* Manfred Retzlaff *(*1938-11-04) en 1984-04-29.*

*MR-148-1 / Arg-720-1447 (2012-12-11 09:05:35)*

*La melodio de tiu ĉi kanto, kiun verkis la aŭtoro Bob Dylon (civila nomo: Robert Allen Zimmermann) ankaŭ, aŭdeblas en* http://www.youtube.com/watch?v=tGO8snK98l0. *Pri la muziknotoj vidu:* http://de.scribd.com/doc/9589786/Bob-Dylan-Blowin-in-the-wind-notes.